

500

Cena numeru 0,50 fr. szw.

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ  
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO

---

---

„Esperantystą jest każdy, kto zna język „Esperanto“ i używa go dla jakichbądź celów“.  
DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“.  
BULONJA DEKLARO.



„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie“.  
DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem“.  
POZNAŃJA DEKLARO.

## ENHAVO:

La Redakcio: Odezva do czytelników. — Jan Kostecki: Ni invitas vin, samideanoj! — V Kongreso de Pola Esperanto Asocio. — Stanisław Braun: Parnasulo. — R. D: Pasero al homaro. — Libroj kaj Gazetoj. — Krasicki: Bajraĥ kaj liaj sentencoj (trad. Helena Hempel). — Kroniko.

ELDONA SOCIETO  
**„POLA ESPERANTISTO“**

KOMP. KUN LIM. RESP.

WIDOK 19, WARSZAWA, POLUJO.

AKCEPTAS LIBROJN,  
PROPAGANDILOJN KAJ ALIAJN  
ESPERANTAĴOJN POR KOMISIA VENDADO.




**ALVOKO!**

La Esperanta Ruĝa Kruco Unuiĝo alvokas ne nur la esperantajn membrojn de la Unuiĝo, sed ankaŭ ĉiujn esperantistojn, ke ili apogu la Ruĝan Krucon en la paca laboro por la tuta homaro. Por tiu-ĉi celo, la subskribita Konstanta Komitato urĝe serĉas en ĉiuj landoj delegitojn kaj aliĝantojn, kiuj plifaciligus la laboron de la organizado, kaj kiuj ne donos kotizon, nur sian propran laboron.

La aliĝojn ni petas sciigi al adreso de prezidanto aŭ sekretariino de la Konstanta Komitato.

Alison A. Nicol,  
265 Kenmure Street,  
Pollokshields, Glasgow,  
Skotlando.

Dr. Géza Halmégyi, kuracisto  
Szombathely, Paragvári utca 18,  
Hungarujo.



# **POLA ESPERANTISTO**

**MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.**

---

---

**JARO XVII.    WARSZAWA — NOVEMBRO | DECEMBRO 1923.    № 10 | 12 (96 | 98)**

---

---

## **Odezwa do czytelników.**

Numer niniejszy, ukazujący się po dłuższej przerwie, kończy rocznik 1922-3. Pomimo katastrofalnego spadku marki polskiej wytrwaliśmy na stanowisku rok cały. Wytrwaliśmy dzięki ofiarności esperantystów warszawskich, członków Towarzystwa Wydawniczego, którzy w ciągu tego czasu dołtęcili z własnej kieszeni do naszego pisma zgórą równowartość 130 franków szwajcarskich. Naał jednak niepodobna pozostawić całego ciężaru na ich barkach. Wszystkie oddziały P. T. E., wszyscy czytelnicy naszego pisma winni przyczynić się do wydawnictwa.

Esperantyści polscy nie pozwolą, aby znowu przestało ukazywać się jedyne esperanckie pismo w Polsce, związane tak ściśle z losami naszego ruchu, że pomyślnego rozwoju jednego bez drugiego wyobrazić sobie niepodobna.

W roku ubiegłym „Esperantysta Polski” umożliwił nam zebrać siły, stworzyć program pracy, określić jasno charakter naszego ruchu, ba, w ciągu jednorocznej zaledwie egzystencji zdołał pozyskać liczbę prenumeratorów, która w normalnych warunkach walutowych wystarczyłaby całkowicie na pokrycie kosztów wydawnictwa i dała w dodatku zysk pokaźny. Gdyby obecnie pismo zniknęło, po kilku latach trzeba by nanowo odrabiać toż samo, cała dotychczasowa praca byłaby zmarnowana.

**Wołamy więc do Was o pomoc!**

Niechaj każdy w miarę możliwości zaabonuje jak największą liczbę egzemplarzy i poleca pismo swoim znajomym!



Niechaj wszystkie Oddziały Polskiego Towarzystwa Esperantystów wybiorą swych najenergiczniejszych członków na Reprezentantów Honorowych „Polskiego Esperantysty” i o wyborze tym zawiadomią bezzwłocznie Redakcję pisma.

Reprezentanci honorowi zbierać będą w swym mieście prenumeratę i pieniądze wraz z listą ofiarodawców przesyłać co miesiąc pod adresem pisma.

„Polski Esperantysta” zginąć nie może!

Nie zginie!

Redakcja i Towarzystwo Wydawnicze  
„Esperantysta Polski”

## Ni invitas vin, samideanoj!

En junio okazos en Warszawa nia ĉiujura parlamento kaj festo. Tiu-ĉiu foje ĝi havos speciale gravan taskon por plenumi, speciale solenan karakteron ĝi portos.

La pollanda movado estas disbatita kaj malfortigita. Momenta konkordo, ekflorinta dum unua pollanda kongreso, rapide kaj senpostsigne velkis. Ne plu ekzistas federacio, kuniganta ĉiujn societojn, kiun ni kun tiom da peno konstruis. Malfavora por nia ideo jaro 1923 ankai en Polujo treege malhelpis la progreson de nia propagando. La atmosfero, saturita de intergenta malamo, sufokis noblan nacifratigan penadon.

Certe, ĝi estas nur efemeraj baroj.

Ni firme kredas, ni scias, ke Lingvo Internacia devas venki, ke ĝin postulas urĝe la nuntempa homa kulturo, ke ĝi devas kroni unu periodon de la civilizo — kaj ekkomenci novan: potencan, feliĉan, vivabundan.

Sed tiu glora rezulto devas esti atingata per longdaŭra laboro, multaj fortostreĉoj, memforĝesaj oferoj. Nia paca armeo bezonas reorganizon kaj firmigon. Ĝi bezonas idealon, kiu blovus freŝan forton en niajn brustojn, kiu altirus novajn, junajn fervorojn. Tro teknike ni faras nian propagandon, aŭ tro klasesme. Esperantismo estas ideo memstara kaj tre vasta. Ĝi ankai ne estas batalsigno, sed — tute male — energio fratiga kaj ama.

Tiuj celadoj interesas ne nur nian Asocion. Ili tuŝas la koron de ĉiu esperantisto pola kaj eksterlanda. Tial ni larĝe malfermas la pordegon de nia kongresejo. Kiu nur parolas la lingvon de estonto, kiu nur amas ĝin — tiu trovos la varman: „bonvenu!” en nia amika rondo.

Du ĉefaj problemoj estos pridiskutotaj dum la kongreso. Unue, la rilato de la pola socio al esperanta movado: kial nia propagando estas tiel malsukcesa? kion fari por kontraŭbatali indiferenton aŭ malsimpatian? al kiaj sferoj ni turniĝu unue kun niaj alvokoj? ĉu estas iaj grupiĝoj, kiuj povus kaj volus nin apogi? — Due, la organizo de pola esperanta movado: kiaj estas kaŭzoj de tiom da dividoj kaj partietoj en nia nacia anaro? kiamaniere forigi ilin? ĉu estas ebla organizaĵo, kiu kunigus ĉiujn esperantistojn polajn? ĉi estas ebla organizaĵo, kiu kunigus ĉiujn polajn societojn esperantajn? ĉu, almenaŭ, estas ebla kreo de la komuna reprezentantaro?

Jen tiom da demandoj interesaj, gravaj por ĉiu, al kiu kara estas Esperanto. Ni ĉiuj kunlaboru por respondi ilin. Ni sendu niajn projektojn kaj proponojn al la Organiza Komitato. Ni aliĝu multnombro al la Kongreso. Ni venu Warszawon kaj diskutu.

Sinjorino Klara Zamenhof akceptis afable la honoran protektadon de la Kongreso. Ŝia altŝatata nomo fariĝu bonaŭgura simbolo al la fruktoj de nia laboro!

*Jan Kostecki.*

Prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato.

# V Kongreso de Pola Esperanto Asocio.

Warszawa, 7 — 10 junio (Pentekosto) 1924.

## UNUA KOMUNIKO.

### Organiza Komitato.

*Prezidanto*: S<sup>o</sup> Jan Kostecki, *Vicprezidanto de P. E. A.*

*Vicprezidantoj*: Prof. Dr. Antoni Czubyński, S<sup>o</sup> Kazimierz Zajaczkowski.

*Sekretarioj*: S<sup>o</sup> Antoni Stankiewicz, Ing. Kazimierz Tymiański.

*Membroj*: Sino Eugénie Cense, Sino Tekla Essigman, S<sup>o</sup> Leon Ferencowicz, Dr. Szymon Karlsbad, S<sup>o</sup> Stanisław Karolczyk, Prezidanto de P. E. A., Prof. Mieczysław Kaus, S<sup>o</sup> Włodzimierz Miernicki.

*Adreso por ĉiuj sendaĵoj:*

**Pola Esperanto Kongreso, Królewska 19, Warszawa.**

La monon oni povas sendi ankaŭ per ĉekkonto de P.K.O. N<sup>o</sup> 3874, sed *prefere* en rekomenditaj leteroj al la supra adreso.

## Laborprogramo de la Kongreso.

1. Oficialaj raportoj.
2. Esperanto kaj la Pola Socio.
3. Organizo de Pollanda Esperantista Movado.
4. Interna vivo de la Asocio.
5. Liberaj proponoj.

Okazos ankaŭ fakaj kunsidoj, ekzamenoj kaj literatura konkurso.

La komitato petas ĉiun samideanon, interesiĝantan pri iu el la temoj, cititaj en la programo, aŭ dezirantan prezenti liberan proponon, ke li sendu siajn opiniojn kaj proponojn *skribe antaŭ 15 de majo*. Ĉiuj komunikoj estos danke *ĉesplorataj kaj laŭeble utiligitaj*.

*La amuza sekcio* preparas por niaj kongresontoj jenajn distraĵojn: koncerto, raŭto, teatra prezentado, ekskurso tra la urbo kaj al Wilanów, komuna vespermanĝo.

*Aliĝoj kaj kotizoj.* Rajtas aliĝi ĉiu esperantisto. Kongresanoj nemembroj dum la kongreso havos samajn rajtojn kiel la membroj de P. E. A. krom rajto de voĉdono.

La kongresa kotizo estas fiksita jene:

1. Membroj subtenantoj: 3 orfrankojn.
2. " ordinaraĵoj: 1 ".
3. Por lernanta junularo: 1 orfranko.

Karaj samideanoj, aliĝu rapide kaj multnombre! Viaj aliĝoj malfermos al ni pli vastan agadkampon.

*La organiza Komitato.*

## Prespropaganda Sekcio.

**Karaj samideanoj!**

La laboro entreprenita de ni ŝajnas unuavide superi niajn fortojn! Jes, sed en niaj koroj enradikiĝis forte kaj tie malfermiĝas tiu dolĉa floro nomata „Fido“. Do, kiam ni akceptis la gravan taskon, kies celo estas prepari la grundon sur kiun ni intencas semi kaj semi... konstante, nia Fido diris al ni, ke tiu laboro estas nepre necesa, se ni volas vidi rezultojn el

nia kongreso. Tion ni konsciis. Nia floreto aldonis, ke kion ni ne povos fari, via samideana helpemo, via sindono al nia ideo kaj fine, via propra fido ĝin faros. Jes ja, ni ne povas atingi ĉion mem! Ni ne povas elkovri ĉiun fonton el kiu ŝprucos iu viviga forto por niaj seĝoj malfortaj. Sed kiam viaj kaj niaj cerboj kaj spiritoj kuniĝos en agado, ni estas certaj, ke ĉiu grundo estos fruktodone esplorata kaj ke ĉiuj entenataj en ĝi produktoj estos utile uzataj.

Jen do, karaj kunlaborantoj, kion ni esperas de via agemo.

Ni intencas pace almiliti la gazetaron, sen kies helpo oni atingas nenion. Tiucele ni starigis programon, kiun ni konigas al vi ĉi-sube. Ni petis kelkajn personojn ĉirkaŭ ni ke ili redaktu artikolojn, presigotajn en kiom eble plej multajn gazetojn laŭ ordo ĉi-suba.

Konante la liston de la projektataj artikoloj, ni ne dubas, ke iu el vi trovos tiun liston neplena kaj volos ĝin plenigi, sendante tuj artikolon, kiun li juĝos necesa.

La Komisiono havas al vi alian peton! Ĉiu el vi, kiu sentas sin kapabla enpresigi artikolon en iu gazeto, bonvolu sin konigi al ni, kaj ni sendos al li tiujn artikolojn tuj post ilia finstarigo. Kiam vi ne povos akceptigi ĝin kiel memstare aperantan artikolon, provu aperigi ĝin almenaŭ kiel parton de la rubriko: Tra la gazetaro.

Ĝis nun ni proponas la sekvantajn titolojn: 1. La Polaj Esperantistoj kongresos en Warszawa dum Pentekosto ĉi-tiujare. 2. Kio estas Esperanto-ĝia celo. 3. Esperanto kaj specialistoj. 4. Esperanto kiel patriota propadanda rimedo. 5. Esperanto kaj scienco. 6. Kiuj estas Esperantistoj. 7. Rilatoj de Esperanto al aliaj lingvoj. 8. Ĉu Esp. estas ligita al iu speciala ideo? 9. Homo valoras tiom da homoj, kiom da lingvoj ii konas. Konkludo: ni lernu Esperanton.

Ĉiu deziranta kunlabori al tiu rubriko de nia kongreso estas petata sendi ĉiun komunikon al „Esperanto“, Królewska 19, Warszawa, aldonante: „Prespropaganda Sekcio“. Antaŭe plej koran dankon.

*La Sekcio Prespropaganda.*

## Pedagogia Sekcio.

*Ekzamenoj.* — Tiu ĉi sekcio konsideris kiel sian ĉefan taskon organizi ekzamenojn, al kiuj rajtos partopreni ĉiu, kiu estos enskribiĝinta kaj sendinta la difinitan pagon antaŭ la 15-a de Majo.

La ekzamenoj estos duspecaj. Unua rajtigos la sukcesinton en ĝi je ricevo de: *Atesto pri lernado*. Tiu ekzameno konsistos el 1. Traduko el lernolibro (Ekzercaro de Zamenhof); 2. Respondo al 3 gramatikaj demandoj; 3. Interparolado esperante kun la ekzamenanto.

La alia ekzameno rajtigos al *Diplomo pri Kapableco*. La kandidato estos petata: 1<sup>o</sup> Traduki iun paĝon, prozan, el la *Fundamenta Ĥrestomatio*. 2<sup>o</sup> Traduki versaĵon el „*El Parnaso de popoloj*.“ 3<sup>o</sup> Skribi esperante pri iu temo donota de la ekzamenantaro, ĝis 50 linioj, sen helpo de vortaro. 4<sup>o</sup> Respondi al 3 demandoj pri gramatiko kaj 3 pri historio de Esperanto.

Lâ ekzamenkosto estas fiksitaĵe jene:

Por la unua 3, por la dua 5 orfrankojn.

*Konkursoj*. La Sekcio organizas ankaŭ konkursojn, kies celo estas elirigi el la ombro iun novan majstron de l' poezio aŭ prozo esperanta, aŭ eligi el tro longa dormado malnovan talenton, kaj doni al ni novan propagandan kaj vivigan materialon.

Ni esperas, ke tiu konkurso estos tre multnombre partoprenata, ĉar ni ne dubas ke ĉirkaŭ ni kaŝiĝas tre multaj kapabluloj, kiujn ni petas, por la bono de ĉiuj, ke almenaŭ momenton ili forgesu sian kutiman modestecon. En ago venko nia!

## Temoj por la konkursoj.

1. Pri aŭ por Esperantaj aforismoj. 2. Poezio ĝis 50 versoj (ne nepre pri amo!). 3. originala noveleto ĝis 5000 vortoj. Temo laŭvola. 4. Propaganda artikolo en pola lingvo pri Esperanto (2 kolonoj en ĉiutaga gazeto).

Por tiu konkurso ni jam ricevis kelkajn librojn kiel premiojn. Ni esperas ricevi pliajn de niaj legantoj! La konkursoj ne esperu gajni oramason!..

Gesamideanoj! la premioj mem ne havas gravan signifon! Ili ne multe pezos sur la pesilo de estonto. Kio estas multe pli konsiderinda, estas la honoro kaj kontento esti alportinta sian ŝtonon al la konstruaĵo, kiu astonte pruvos la konstantecon de la laboro kaj la obstinan persiston de la konstuintoj. Tio certe estos por vi, kiel estas por ni, plene sufiĉa.

Ni laboru kun fido, se ni volas vidi la fruktojn de nia laboro.

*La Pedagogia Sekcio.*

Noto. La nomo de konkursanto devas troviĝi en aparta malgranda koverteto interne de la sendata manuskripto. Sur koverteto oni skribas devizon, per kiu estas signita ankaŭ la manuskripto.



## Parnasulo.

*Abundecon havas veran  
Da rimistoj la Esperan-  
tujo.*

*Tiu fakto tiel tipa,  
Kvazaŭ Muza estus ĝi pa-  
trujo.*

*Ce ni ĉiu, aglo venka!  
Bardon tuj simias, senka-  
pulo.*

*Se nur stelon ekis porti,  
Estri Muzojn kredas, forti-  
kulo.*

*Kaj pro tio, vane miri,  
Nin inunde falas firi-  
majoj  
Kaj en poezio falsa  
Tiom multaj estas malsa-  
ĝaĵoj.*

*Grimpas do stultec' heroe  
Sur Olimpon de la Poe-  
zio,  
Sed pro tio nur graveda  
Kompatinda verda reda-  
kcio.*

*Post monato, tia raŭpo  
Jam presita nigras laŭ po-  
stulo,  
Kaj post jaro... ŝanĝo karna —  
Papilio nova: Parna-  
sulo.*

Stanisław Braun.



## Pasero al homaro.

(el lingvo germano.)

*Vi vidas, estimata homo,  
Kia vetero ekster domo:  
La neĝo kuŝas, vento blovas,  
Birdet' apenaŭ vivi povas! —*

*Mi petas Vin: dum tempo tia  
Vi havu min en zorgo Via  
Kaj ion el la gren' sufica  
Vi donu el la tablo riĉa.*

*Ni dankos Vin pro ĉiu ero,  
Kaj dum varmega la somero  
Per pepo, triloj, kantoj vetaj  
Vin rekompenci estos pretaj!*

*„Flugilohava ĥor“ min sendas,  
Kaj ĝin al Vi mi rekomendas...  
Kampaton montru, koro bela! —  
Respekte — la paser' fidela. —*

Tradukis R. D.



## Libroj kaj Gazetoj.

*A. Niemojewski: Legendoj. Trad. Bronisław Kuhl, eld. F. Hirt & Sohn, Leipzig. Dua eldono.*

Dua eldono en Esperantujo ne estas aperaĵo tro ofta kaj tiu fakto jam rekomendas la verkon. Efektive, la noveloj de Niemojewski apartenas al speco de neforpasantaj valoro kaj beleco kaj bone faris la tradukinto, donante ilin al internacia publiko en esperanta vesto. La „Legendoj“ estis skribitaj kun religia tendenco, tamen kelkaj el ili (ekzemple la „Majlah“) impresas same forte kiel la samtemaj rakontoj de Papini. La valora kolekto (bedaŭrinde nekompleta) estas tradukita majstre kaj s-ro Kuhl, tiom talenta tradukisto kaj unuagrada stilisto, povus kaj devus okupi la orfigitan de d-ro Kabe lokon. Kaj tial, dezirante ĝisatendi ankoraŭ plurajn eldonojn de la jam aperintaj verkoj, ni samtempe tre forte volus en plej proksima estonto ekvidi ankaŭ iom pli da... unuaj eldonoj de novaj tradukaĵoj, devenantaj el la majstra plumo de Bronisław Kuhl.

St. Br.

JEAN FORGE.

## Abismoj.

*Romano originale verkita. Hirt & Sohn, Leipzig. 1923.*

„Estante nacilingva verkisto, mi sentas la tenton skribi originalan romanon en Esperanto... Mi deziras kontentigi per ĉi-tiu verko la guston de l' moderna leganto... verkante ion nuntempan en la Esperanto de la jaro 1887 kaj fine restante internacie komprenebla kaj sendependa de ia nacilingva idiomo“ — skribas la aŭtoro en la antaŭparolo al la antaŭ nelonge aperinta romano.

*O jerum, jerum, jerum, qualis mutatio rerum!* zumas en la oreloj aŭdita iam studenta kanteto: Antaŭ kelkaj jaroj petis Esperantisto de eminenta nacilingva aŭtoro permeson traduki lian novelon en Esperanton kaj ricevis rifuzon, ĉar „li tro alte ŝatas sian patrollingvon kaj sian talenton, por ke li povu permesi profani ilin per tradukado en ian arteflikitan ĵargonon.“

Rapide ni veturas! En unu el proksimaj stacioj ni eble aŭdos, ke Esperanta verkisto ricevinta literaturan Nobel premion malpermesis traduki siajn verkojn nacilingven, ĉar li pro tio estis verkanta internacie, ke oni ne difektu ilian ĉarmon per pli aŭ malpli mallertaj tradukoj en naciaj idiomoj.

La mallongigo de distanco al tiu stacio dependas iom de ni legantoj. Ĉi tiu aserto povas ŝajni paradoksa, ĉar ja „spiritus flat ubi vult“ kaj nia eĉ plej granda dezirego ĝin al niaj vicoj nefacile povos allogi, tamen... tamen ju pli ni niajn verkistojn ŝatos, ju pli ni iliajn verkojnle gos kaj ju pli multnombre tiuj verkoj estos aĉetataj, des pli ofte ili aperados, ĉar la verkistoj kaj ankaŭ iliaj mecenatoj — eldonistoj vidos sian intereson eldoni ilin. Kaj en la amaso troviĝos iam verko, kiu superstaros la aliajn.

Tial ni demetu la ĉapojn antaŭ unua nacilingva verkisto, kiu eniris nian vagonaron, ni preparu por li bonan lokon, por ke li sentu sin oportune inter ni kaj ne forlasu nin ĉe iu haltejo.

Ĉar la aŭtoro de „Abismoj“ faras la impreson de provanto: ĉu mi sukcesos aŭ ne ĉe tiu popoloeto verdstela? Oni tiom rakontas pri la multnombreco de Esperantistoj kaj pri ilia literaturo, kvankam kvante jam riĉa, sed precipe koncerne la originalajn verkojn ankoraŭ tre mizera — ke eble valoras akiri famon en Esperantujo; oni povas provi.

Kaj ĉiu ŝatanto de nia literaturo devas preĝi al la feino de Esperanto, ke la kaprica popoloeto por unu tago ĉesu kolekti la poŝtmarkojn kaj tralegu la „Abismojn“, ke tiu verko disvastiĝu tra ĉiuj esperantistaj bibliotekoj, ke S<sup>o</sup> Hirt kaj lia filo aĉetu

bienon por la enspezitaj svisaj frankoj kaj per la resto eldonu daŭrigon de vizioj montritaj al S<sup>o</sup> Forge de hinda fakiro.

Kial daŭrigon?

Ĉar ĝin bezonas la romano. En penstransigo, en kiun enkondukis lin la hinda fakiro, la aŭtoro ne atingis ankoraŭ fundon de homaj abismoj.

Estis nome jene:

Fraŭlino Halino Borki atingis la agon, en kiu fraŭlino revas... revas pri reĝido fabela, per ĉiu fibro sopiras al tiu reĝido kaj en ĉiu renkontita viro vidas tiun reĝidon. Ne estas do mirinde, ke veturante en vagonaro ŝi enamigas en dormetanta juna sinjoro; ĉu ja ne estis miraklo, preskaŭ fabela miraklo, ke tiu juna sinjoro en dormo preterpasis sian stacion kaj devis akcepti la gastamecon de sinjoro Borki por pasigi la nokton kaj montriĝis multe promesanta pentristo — artistoj ja ankaŭ iafoje portas kronojn ne tiom orajn kiom laŭrajn — kaj estis bela kaj nomiĝis Mateo Ardo. Jam pro la nomo la koro povus ekardi! Sed la pentristo sekvintan tagon forveturis ne vidinte Halinon kaj ne sciiginte ŝin ke li baldaŭ intencas ĉi-tien reveni por pentri belajn pejzaĝojn, inter kiuj ŝi estis la plej bela. Do Halino, kies koro sopiras al viro, kies ĉiu sangoguto bolas, post kelkaj tagoj ĵetis sin en la ĉirkaŭprenojn de diboĉulo staranta ĉe limo de financa ruino kaj de *delirium tremens*; la pasio ne permesas eĉ al ŝi eksenti dum la kisado brandodoron de liaj lipoj. Tamen la artisto revenis, eble eĉ pli frue ol li mem intencis malgraŭ la ĝojo de lia edukintino kaj de lia fianĉino, kiuj lin longe ne vidis, malgraŭ la preparataj de ili kafo kaj kukoj, kontraŭ eĉ sia propra volo. Komenciĝas idilio de alproksimiĝado de destinitaj por si animoj — idilio, kiu samtempe enhavas en si elementojn seriozajn, se ne eĉ tragediajn. La pentristo hezitanta inter la amo al Halino kaj devo al sia fianĉino, forpuŝas la pasiajn brakojn de amatino, kiu pro konscienciproĉoj ne sentas sin sufiĉe forta por lin reteni, kaj forkuras al la fianĉino en la sama momento, kiam la diboĉulo, vidante siajn esperojn detruitaj, en paroksismo de delirium bruligas sian domon kaj mem en la flamoj pereas.

Ruza estis tiu hinda fakiro. Oni ricevas la impreson, ke li intence ne montris al S<sup>o</sup> Forge la fundon de spirita abismoj de la ĉefpersonoj, por ebligi al li en estonta vizio vidi la pluan daŭrigon de komencita konflikto. Ĉar la nuna fino estus ebla nur sub la kondiĉo, ke la artismo de Mateo Ardo montriĝus nur talento sufiĉanta por esti profesoro de desegnado en iu meza lernejo kaj kontentiĝanta per oportunaĵoj de pantofloj kaj kafo kun kremo, preparataj de la fidela al li kaj modesta

spirite edzino. Tian impreson faras lia cetere tre dolĉa kaj simpatia fianĉino; ŝi devis esti kontrasto al Halino — devis prezenti bonan mildan animon kompare kun la „nigra karaktero“ de ŝia kontraŭulino, kiu tamen ne tiom estas nigra, kiom flama, pasia kaj iom sovaĝa temperamento, povanta doni al artisto pli da inspiro, ol la zorge vartita kaj flegita kreskaĵeto, suferanta je ioma spirita anemio. Se tamen Ardo estas vera talento, baldaŭ povos al li manki en la „hejma“ atmosfero aero por plenbruste spiri kaj tiam li eble serĉos ĝin en la kamparoj de So Borki.

Tiu hinda fakiro, montrita en la prologo kaj epilogo, donanta temon al la romano al maljuna kaj elĉerpita aŭtoro, kiu sian „cerbon surpaperigis“, ŝajnas tuj depost komenco ioma mistifiko. Legante malgraŭvole oni deziras diri: ne, kara S<sup>o</sup> Forge, vi ne estas maljuna kaj elĉerpita, troon da vigla, juneca temperamento vi posedas, tro akran talentoingon vi montras; ne, „el via kapo oni ankoraŭ ne fortrinkis vian cerbon“, ĝi sufiĉos por kelkdeko da tiaj tiom interesaj kaj emociaj verkoj.

Tamen ne mistifiko! kiam oni finas legi la romanon, restas iom maltrankviliga sento, ke tiun hindon oni ie vidis. Kaj enpense oni trarigardas la literaturon... aha, oni ja konas lin. Jes, jes, li estas reala, lia nomo — Rabindranath Tagore. Ne en la ideo, ne en la enhavo, sed en la formo. Ekzistas verko de Tagore, kunmetita el fragmentoj de la memorlibroj de agantaj personoj; el tiuj fragmentoj formiĝas romano. Nun oni komprenas la vortojn pri kontentigo de la gusto de l' moderna leganto. S<sup>o</sup> Forge pruntis de la eminenta hindo la formon: en „Abismoj“ ĉiuj personoj laŭvice rakontas siajn pensojn kaj tiel permesas penetri en la fundojn de siaj animoj.

La mistifiko ne sukcesis... Oni ne pensu tamen, ke tiu senmaskigo estas riproĉo kontraŭ la aŭtoro. Kontraŭe, oni devas laŭdi lian elekton de l' direktinto, des pli ke la montrita influo limiĝas nur je la formo — skeleto, kium S<sup>o</sup> Forge ĉirkaŭis per propre kreita karno kaj sian propran spiriton al ĝi inspiris.

Cetere la senmaskigo facile povas esti imagaĵo de kritikastro, flaranta en ĉiu verko influon de iu alia verko kaj ĝojeganta, ke li tiun influon trovis tie, kie ĝi tute ne ekzistas.

Tiu formo de l' romano estis danĝera eksperimento, kiu facile povis difekti ĉiujn intencojn de l' aŭtoro. Li devis fleksebligi la lingvon al la necesa reprodukto de diversaj temperamentoj de la rakontantaj personoj. Eksperimento tre malfacila precipe por aŭtoro unuafoje verkanta en „fremda“ idiomo, al kiu li ankoraŭ ne alkutimiĝis. Sed ĝi plene sukcesis. Ĉiu persono parolas sian propran stilon, eĉ ŝanĝas ĝin laŭ la



ŝanĝo de sia animstato: de abruptaj, krudaj, ŝirataj vortoj de deliranta ebriulo, tra varmaj, pasiaj eksplodoj de ĝuojn avidanta virino kaj duonkonscie ŝin sekvanta artisto, ĝis la milde sopiraj revetoj pri feliĉo de anemie senkulpa knabino.

La aŭtoro plenumis pli, ol li promesis: lia Esperanto estas tiu de la jaro 1887, sed pliriĉigita per sia 35-jara disvolviĝo kaj per la talento kaj temperamento de S<sup>o</sup> Forge.

*Baroko.*

HANS KOCH.

## La Esperantisto en Germanio.

Gvidlibro tra la germana lingvo. Sudgermana Esperanto-Eldonejo, Oskar Ziegler, Deisenhofen b. München.

La „Ligo de nacioj“ montras kelkrilate rimarkindan similecon al la oficialaj lingvaj institucioj de Esperanto. Jen ekzemplo: „Ligo de nacioj“ decidis per sia komisiono, ke Esperanto ne estas necesa kaj ke preferinda estas la kulturado de naciaj lingvoj; tuj Sinjoro Koch montris al ĝi, ke plej bone oni tion povas fari rilate al la germana lingvo per Esperanto. „Lingva komitato“ decidis, ke „io“ ne estas necesa kaj ke preferinda estas la fideleca „uj“ por la landnomoj; tuj la sama sinjoro uzis „ion“ cetere neĝuste — en la titolo de sia verko\*).

„Esperantisto en Germanujo“ estas komparebla kun niaj Ĉefeĉaj ŝlosiloj. La konoj de germana lingvo akiritaj per ĝi estas pli malpli samaj, kiel la kono de Esperanto ĉerpita el Ĉefeĉ. Kapabla individuo same povos legi „Die Räuber“ post trastudo de l' verketo de S<sup>o</sup> Koch, kiel post trastudo de la ŝlosilo, li legos „La rabistoj“ — n. Sed kiel la ŝlosilo, same ankau ĉi tiu lernolibro havas la celon pli modestan, nome doni al la lernanto la eblon ekkoni la konstruon de la lingvo kaj prepari lin al la praktiko de l' ĉiutaga vivo. Ĉi tiun taskon solvis la aŭtoro modele: en simpla kaj klara maniero li enkondukas en la malfacilaĵojn de l' germana lingvo tiel, ke

---

\*) Al S<sup>o</sup> Koch kaj multaj aliaj „ianoj“ mi ŝuldas la duban dankon ĉar ili efektivas mian profetaĵon, ke de post la decido de „L. K.“ la Esperantistoj uzados amase la sufikson „io“ anstataŭ „ujo“. Ĉi tiu profetaĵo (vidu mian artikolon: Solvo nenion solvanta en N<sup>o</sup> 4 de P. E.) elvokis hajlon da indignoj kontraŭ mi, kvazaŭ mi propagandus malfidelencon al la „L. K.“ — aj decidoj. Tial la indignintoj bonvolu akcepti la informon, ke mi tute ne pledis por „io“ aŭ kontraŭ „ujo“, ĉar mem mi estas fidela „ujano“ sed simple asertis, ke la solvo de la „L. K.“ ne elĉerpis la landnoman problemon kaj pro tio povas kaŭzi malutilajn konfuzojn. La ŝupra ekzemplo pravas bedaŭrinde la pravecon de mia antaŭdiro.

eĉ lerninto el aliaj pli ampleksaj verkoj kun utilo povos ĝin trastudi kaj ne unu interesan detalon al si alproprigi. Oni povas garantii, ke diligenta studinto povos facile travojaĝi Germanujon kaj aliajn landojn enloĝatajn de Germanoj laŭlonge kaj laŭlarĝe.

Nur unu estas diferenco: la Ĉefeĉa ŝlosilo estas 20-paĝa, dum la „Esperantisto en Germanio“ havas 184 paĝojn de duobla formato. Sed tio ne estas jam kulpo de Sr Koch. Li faris ĉion eblan, por doni maksimumon da enhavo en minimuma amplekso kaj en tio li bonege sukcesis. Ĉi tiu malgranda diferenceto bonege ilustras la „ĝustecon“ de la decido de „Ligo de nacioj“. Al ĝia estiminda komisiono oni devus donaci po unu ekzemplero de ambaŭ verkoj por afabla pripensado de ilia glora decido.

*Baroko.*

### Ricevitaj gazetoj.

Nombroj en parentezo signifas numeron. — Arguso (10 11, 1, 2), Belga Esp. (7-8, 9-10, 11-12), Brazila Esp. (6-9), British Esp. (222, 224, 225, 227), Bulgara Esp. (3, 5), Corriere Balcanico-Esp. (29), Esp. Junularo (15), „Esp. Praktiko“ (56-7), Esp. Triumfonta (157, 158, 160, 163 164, 165, 166, 167, 168, 169, 170, 171, 172, 173, 174, 175, 176), France-Esp. (45), Germana Esp. (332, 333, 334, 335), Holanda Esp. (93, 94, 95, 96, 97, 98, 99, 100, 101, 102, 103, 104), Hungara Esp. (1), Informoj de P. T. T. (1, 2, 3), Internacia Komercio (5, 6), International Language (1), Int. Medicina Revuo (5, 6), Itala Esp. Revuo (8, 9, 10, 11, 12), Literaturo (19), Lumturo (2-3, 6, 7), Marto (8-9, 11, 12), Norvega Esp. (3-4, 5), Nova Epoko (6-7), Por la indiĝenoj (4, 5-6), Revuo (1) Revuo Orienta (8, 9, 11, 12) kun jarlibro 1923, Semisto (34), Sennacieca Revuo kun literatur-sciencaldono (43, 44), Svenska Arbetar-Esp. (Sept.) Vegetarano (1), Verda Lumo (1), Verda Ombro (9, 10), Vero (14, 15), Völkerspiegel (1). — Enhavas tradukojn el esp. gazetaro: „Głos Polski“ (27), „Kurjer Łódzki“ (32), „Republika“ (254, 261, 289, 303, 27), de Łódź kaj priesperantajn artikolojn „Ziemia Lubelska“ (148, 170), de Lublin kaj „Echo Warszawskie“ de Warszawa. Krom tio ni ricevis „Academia pro Interlingua“ (4).



## PRZEKŁADY Z POLSKIEGO NA ESPERANTO:

Po uzyskaniu *zezwoleń autorskich* ukaza się w tłumaczeniu esperanckim:

- STEFANA ŻEROMSKIEGO „Duma o Hetmanie” (tł. Dr. Antoni Czubyński, Warszawa).
- HENRYKA SIENKIEWICZA „Sachem” (w przekładzie D-ra Ignacego Dziedzica, Toruń).
- STEFANA ŻEROMSKIEGO „Cokolwiek się zdarzy” (tł. Dr. Ignacy Dziedzic, Toruń).
- JERZEGO ŻUŁAWSKIEGO „Eros i Psyche” (w tłumaczeniu p. Antoniego Stankiewicza, Warszawa).
- TEODORA TOMASZA JEŻA (MIŁKOWSKIEGO) „Piotr i Asan” powieść historyczna na tle dziejów słowiańszczyzny południowej (w tłumaczeniu p. Antoniego Stankiewicza, Warszawa).
- ANTONIEGO CHOŁONIEWSKIEGO „Duch dziejów polskich” (tł. Antoni Stankiewicz, Warszawa).
- ANTONIEGO LANGIEGO „Eksperyment” (w tłumaczeniu p. Włodzimierza Pfeiffra, Łódź).

Oczekujemy dalszych zgłoszeń do opublikowania. (W)



Ign. Krasicki.

# Bajrah kaj liaj sentencoj.

Fabelo hinda.

(Tradukita de Helena Hempel.)

Hindujo, la feliĉa lando azia, enhavadis ĉiam multe da homoj justaj, kiuj ekaminte virton, preferadis ĝian noblan praktikadon ol ĉiajn aliajn profitojn. El ilia nombro estis Bajrah loĝanta ĉe bordo de l' fama rivero Ganges. Li apartenis al la unua generacio de Braminoj, sed lia altidea spirito aljuĝadis nur al okazo tion, kio estis al li sola propra kaj li eĉ nek sciis nek sentis en si ion ajn, kio lin diferencigus de aliaj homoj.

Li estis alfa je kvin futoj, sep kaj duono da coloj — kaj lia servisto, Daĥar, kvankam devenanta de kvara generacio, do malpli altnobela ol li, je tri gradoj, havis ses futojn kaj du colojn da alteco. Li ankaŭ manĝadis pli multe kaj pli gustume ol lia sinjoro, tamen neniam plendis pro nedigestebleco.

Tio fiksis Bajraĥon en lia pensmaniero pri supozaj diferencoj; ekzemple pri la rivero, ĉe kiu li loĝis, li opiniis, ke ĝi nenion rimarkeblan en si havis kaj nur per tio diferencis de aliaj, ke ili en ĝin enfaladis kaj ĝi kun ili fluis al maro.

Tiu homo ekstreme bona estis edukita en la eminenta akademio de l' urbo Benares. Lia majstro, Dabul, estis granda homo; unue pro tio, ke, estante majstro, li instruadis la malpligrandulojn — kaj due pro tio, ke li sciis esti majstro, ĉar li ricevis de Tamerlan oran pokalon, kiel rekompenco pro la verkita de li panegiraĵo pri lia favoro. Estis ankoraŭ pli multe da tiaj grandecaŭzoj, sed pro bezono de mallongigo, ili devas esti forlasitaj.

Tiu granda homo senĉese ripetadis, ke „kiu havas scion, havas ĉion“. Bajraĥ, kiu deziris havi ĉion, komencinte lerni, lernadis do plue, tiel diligente, persiste, vigle, obstine kaj entuziasme, ke li verkis dek unu librojn pri regadscienco; kvar pri milito; sep pri arĥitekturarto; dek pri hindaj genealogoj, kie li metis la Braminojn en unuan lokon; dudek pri la historiaĵoj; tri pri agrikulturo — kaj unu pri muzikreguloj.

Kvankam li verkis tiom da libroj, li ekrimarkis kun miro, ke malgraŭ la paroloj de lia majstro, li nenion havis, Ĉesinte do verki, li vendis la librojn, aĉetis proksime de l' urbo malgrandan bienon kaj okupis sin per terkulturado.

Ne posedante jam kaj ne volante posedi librojn, li tamen aĉetadis ĉiujare almanakojn kaj sur kartoĵoj tie enkadritaj, li skribis multajn rimarkojn aŭ konsilojn. Kaj la almanakojn li gardis zorge, ĉar cetere, li ĉion konservadis.

Kiam li mortis, restis inter aliaj postlasaĵoj, ankaŭ la almanakoj. Tiun kolekton lia vidvino oferis al sia fratino. Ĉi-tiu donacis ĝin al sia nevo, kiu, siavice, donis ĝin al iu feltisto en Smirna. Tiu komercisto, per ĝiaj folioj ĉirkaŭvolvis la ermenojn, kiujn akiris de li iu judo kaj vendis ilin fine al unu landano, kiu, ordiginte kaj traleginte la foliojn, ekopintis, ke kvankam la ermena pelto multe lin varmigas, ĝia envolvado estis por lia spirito ankoraŭ pli ŝatinda varmigilo.

Dezirante, ke krom li, ankaŭ la aliaj de ĝi profitu, li publikigis tiujn aforismojn kaj sentencojn kaj tiamaniere ili fariĝis konataj en diversaj lokoj de Hindujo.

Jen la enhavo de tiuj seninterligaj notaĵoj:

\* \* \*

„Kiam mi eklokiĝis en kamparo, kie mi ĝis tiutempe neniam estis kaj pri kampara vivo nur tiom sciis el libroj, ke ĝi estas dolĉa kaj amuzplena, mi imagis, ke ĉiu torento ĉarme tie murmuris, falante sur ŝtonetojn, ke ĉiuj arboj per siaj

disetenditaj branĉoj donas ĝuindan ombraĵon, ke la paŝtistoj kun paŝtistinoj, ornamitaj per florkronoj, kantas poeziajn melodi-  
ojn de Saadi. Jen, en realeco, mi nek trovis bruetantajn torent-  
ojn, nek branĉericaĵajn arbojn — ĉar ilin detruis la soldatoj de  
Tamerlan. La paŝtistinoj, anstataŭ rozaj girlandoj, havis sur  
si sponaŭ iajn vestaĵojn — kaj pri Saadi aŭ liaj kantoj ne-  
niu eĉ en tuta ĉirkauaĵo aŭdis.

Sed tio nur komence min ĉagrenis, ĉar pro laboro, post  
iu tempo, mi malkovris fontojn kaj trovis torentojn; mi plan-  
tis arbojn kaj ĝisatendis ilian ombron. Monhepinte la terlabo-  
ristojn, mi ekvidis fine paŝtistinojn en florkronoj; ili ne fanfa-  
ronas per instruitaj kantoj, sed vigle kaj libervele saltas — kaj  
tio, kion la ĝojo al iliaj buŝoj alportas, estas por mi pli agraba.  
Ol la kantoj de Saadi.

\* \* \*  
„Vizitis min hieraŭ la plej ĝa filo de nia Kadi, kiu ĵus  
revenis domon, post la finita edukado. Ĉiun demandon li sen-  
halte respondas. Tio pruvas, ke li estas malprudenta.”

\* \* \*  
„Enirinte foje en Benaresan sanktejon, mi multe ekmiris  
pro ekstrema grandeco de l' statuo de Brama. Tiam la mal-  
junulo Aĥar, kiu sidis en la vestiblo, al mi diris: — Statuoj  
kaj homoj, kiam ili estas altigitaj, tute inverse aspektas: statu-  
ojn, proksimiĝinte, oni ekvidas pli grandajn; homoj, ĉe proksi-  
miĝo, montras sin malgrandigitaj.” *(Daŭrigota.)*

## Kroniko.

— La 15an de decembro okazis on la loĝejo de P. E. A.  
en Warszawa, Królewska 19, funebra soleno por honorigi la  
memoron de nia Majstro kaj de antaŭ monato mortinta fama  
hungara esperantisto Prelato Aleksandro Giesswein. Paroladis  
S-ro A. S. Stankiewicz kaj S-ro E. Cense. Samtempe prof.  
M. Kaus faris poresperantan lekcion en pola lingvo. Matene la  
saman tagon estis diservita en preĝejo de S. Anna funebra me-  
so por Prelato Giesswein, kiun ĉeetis S-ro Klara Zamenhof.

.....  
Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK  
.....

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.

Funkcias nur lunde kaj jaŭde de 8—10 h. vespere.

---

„Nia unua Honora Reprezentanto estas:  
S-ro Włodzimierz Pfeiffer, Księgarnia Piszera, Łódź.”

---

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Podleśna 26.



## OD ADMINISTRACJI.

Kilkakrotnie zwiększone (według wartości złota) koszty wydawnicze zmuszają nas do odpowiedniej zwyczajki prenumeraty, która wynosić będzie odtąd franków złotych 6.— rocznie według kursu dnia wpłaty. Cenę pojedynczego numeru ustalamy na fr. zł. 0,50.— Ufamy, że podwyżka ta będzie już ostatnią!

Zarazem miło nam zawiadomić Sz. Czytelników, że w r. 1924 „Polski Esperantysta“ stale zawierać będzie artykuły propagacyjne w języku polskim, co każdy numer jego uczyni wartościowym środkiem propagandy.

## Pola Esperantisto en 1924.

En venonta jaro nia gazeto enhavos kiel konstanta fako *propagandajn artikolojn en pola lingvo*. Ĝi publikigos ankaŭ, en Esperanto, serion de *ekonomiaj studoj* pri nuntempa Polujo, de la plumo de unu el la plej eminentaj esperantistoj polaj kaj profunda konanto de niaj komercaj rilatoj. En literatura fako ni interalie aperigos la novelon „*Sahem*“ de la genia *Henryk Sienkiewicz*, la fama aŭtoro de „*Quo Vadis*“, en kompetenta traduko de D-ro *Ignacy Dziedzic*.

Tiu-ĉi numero, lasta por 1923, aperas dank' al mona kunhelpo de Grupoj de P. E. A. en Poznań (złp. 28) kaj en Łódź (30 milionoj mk. kaj złp. 10), kiujn la Redakcio kore dankas, en la nomo de la gazeto, por ilia malavara oferemo. *La Redakcio.*

---

Zarząd Pol. Tow. Esp. zawiadamia swych członków że zebrania odbywają się co czwartek od 8-10 wiecz. w lokalu Tow. Królewska 19. Kancelaria i biblioteka czynne są o tej samej porze.

# WOLNA MYŚL,



# WOLNE ŻARTY

(LIBERA PENSO, LIBERAJ ŜERCOJ)  
plejdisvastigita humora revuo en Polujo

Redakcio kaj Administracio, Łódź, Andrzeja 17.

Prenumerata zagraniczna 4 dolary rocznie.



Ročníky z 1923 r. z přešytką w cenie 1 dolara.

## Księgarnia LUDWIKA FISZERA w Łodzi

Piotrkowska 47

**Poleca następujące wydawnictwa, niezbędne do nauki języka Esperanto:**

Borel-Pfeffer,	Ĉu vi, parolas Esperante? (Rozmówki esp.—polskie)	Mk.	900,000
Cart i Borel,	Esperanto w 10 lekcjach	"	1,350,000
"	Klucz do tegoż	"	450,000
Gzarnowski,	Łatwy podręcznik Esperanta	"	720,000
Grabowski,	Słownik polsko-esperancki (większy)	"	7,200,000
"	" (mniejszy)	"	3,240,000
"	Słownik esperancko-polski (większy)	"	5,040,000
"	" (mniejszy)	"	3,960,000
Makiewicz-Grabowski	Sinjoro Tadeo	"	10,800,000

Wysyłka tylko za uprzedniem nadesłaniem gotówki.  
Do każdego zamówienia należy dodać 10% wartości na  
koszta przesылki.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Podleśna 26.